



ESPERANTO n°177

NORMANDA BULTENO

unuiĝo de la normandaj esperantistoj JULIO 1993.

N°177 (NS 92) Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris

JULIO 1993

76120 LE GRAND QUEVILLY Tel. 35 69 66 09

Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes
de Normandie CCP 283-40 H ROUEN

LANDA KONGRESO en NORMANDIO :

Grava evento okazis en nia provinco dum Paskaj festoj 1993.

Kvankam normanda esperantistaro aspektas dormema kaj senaktiva, ni sukcesis organizi kvintagan kongreson kiu kontentigis ĉiujn partoprenintojn.

Herouville-Saint-Clair grupo estis ĉeforganizanto sed aktivuloj el LE Havre, Grand Quevilly, Yvetôt kaj aliaj estis membroj de OKoKo (Organiz-Kongres-Komitato) kaj kontribuis al organizado. Kvankam kongreso de SAT-Amikaro (Por-Esperanta asocio en Francalingvio), tiu manifestacio estis malfermata al ĉiuj esperantistoj. Multaj gastoj, -ne membroj de SAT-Amikaro-, ĝin partoprenis. Kompreneble, nur membroj rajtis voĉdoni por diversaj asociaj raportoj. La programo estis tre riĉa: ekskursoj, vizitoj, prelegoj, vesperaj spektakloj estis diversaj kaj altkvalitaj. Kursoj por komencantoj kaj perfektigantoj estis gvidataj de kompetentaj instruantoj.

La kongreso havis internacian etoson ĉar ĝin partoprenis multaj nefrancilingvanoj: 4 Rusoj, 3 Litovoj, kelkaj Germanoj, Belgoj, Nederlandanoj, Norvegino, Finlandano kaj multaj Britoj. Enskribiĝis entute 236 gekongresanoj.

Sed kiom da Normandoj?

- 9 el RĜena regiono
- 5 el Le Havre kaj Notre Dame de Gravenchon
- 1 el Yvetôt
- 4 el Fécamp (gepatroj kun 2 infanoj)
- 10 el Calvados

Estas strange ke pli multaj Normandoj ne deziris profiti okazon praktiki Esperanton en sia propra regiono. Antaŭ kelkaj jaroj, UFE (Esperanto-France)

organizis sian nacian kongreson en Rouen. Tre malmultaj estis niaj samre-gionanoj. Kial plendi ke Esperantista movado ne estas sufiĉe vigla se oni rifuzas ĝin subteni?

Organizado de tiu kongreso okazigis al aktivuloj multe da penoj sed ankaŭ multe da plezuroj. Multaj partoprenintoj revenis hejmen pli energiaj kaj pli laboremaj ĉar pli konvinkitaj pri valoro de nia idealo.

En Normandio, multo estas fareda por diskonigi nian lingvon sed ni bezonas pli da novaj aktivuloj por relanĉi la aferon.

En tiu-ĉi bulteno, vi legos interesan raporton pri instruado de Esperanto al infanoj en Fécamp. Vi trovos informon pri Franca Katolika Esperanto Asocio. Vi sciu ke samideano Albert Bessiere el Rouen estas prezidanto de tiu katolika asocio. Eble vi legos kun surprizo ke kelkaj interesiĝis al Esperanto dank'al joga (yoga).

Mi esperas ke multaj Normandoj praktikos nian lingvon ĉi-somere:

- ĉu en Valencio 24-31/07/93 okaze de Universala Kongreso
- ĉu en Kazanlak (Bulgario) 14-21/08/93 okaze de SAT Kongreso
- ĉu en Antverpeno "Kultura ĉefurbo de Eŭropo" 16-24/07/93
- ĉu en Esperantista Kulturdomo en Grésillon
- ĉu en "La Kvinpetalo", internacia stagejo en Bouresse (86)
- ĉu en Kultura Centro Esperantista en La Chaux de Fonds (Svislando)
- ĉu... ktp...ktp...

Kaj poste, reveninte ne forgesu sendi artikolon por nia bulteno.

Petro KIJO.

***** NUN LA KASISTO !!!!! :

Jen listo de kotizintoj por jaro 1993: GeSinjoroj Angenault, Bataille, Bessiere, Charron, Defrance, Feret, Guérout, Guerre, Haulard, Jouvin, Legros, Le Héricey, Le Mazurier, Loisel, Martin, Maurice, Mendes, Michel, Millet, Pottier, Quillaud, Quillet, Robiolle, Roblin, Saunier

Se via nomo ne estas en la listo, tio signifas ke ni atendas vian ĉekon. Ne atendu ĉar ni bezonas monon por propagandi.

KATOLIKOJ kaj ESPERANTO.

Kiam esperanto ekfloris, tuj multaj katolikoj entuziasmiĝis pri la internacia lingvo kaj partoprenis en la esperanto-movado.

En 1902 Pastro Emile Peltier, juna profesoro en la kolegio Sta Gregorio en Tours esperantiĝis kaj, unu jaron poste, en 1903, li eldonis la revuon "Espero Katolika", kiu havis etan sukceson.

Okaze de la kongreso en Boulogne apud maro en 1905 Pastro Peltier organizis diservon, kiun, kvankam ne kristano, Zamenhof ĉeestis. Je la fino de la sama jaro Pastro Peltier, ĝera pioniro de moderneco, proponis, ke la revuo Espero Katolika fariĝu ekumena. Li do malfermis ĝin al ĉiuj kristanaj fratoj. Tiu ideo ricevis favoran apogon.

La sekvantan jaron la Papo PIO X-a transdonis al la redaktoroj de la revuo sian apostolan benon. Tio kuraĝigis la katolikajn esperantistojn kaj okaze de la Universala kongreso en Genevo Pastro Peltier predikis en esperanto.

La revuo prosperis sed oni devis atendi ĝis la jaro 1907, por ke estu starigita asocio de katolikaj esperantistoj. Tiu asocio ĉiam viglas sub la nomo Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj havas sian sidejon nun en Romo. La revuo Espero Katolika ĉiam aperas.

Nuntempe en Francio la katolikoj havas sian propran asocion: Franca Katolika Esperanto-asocio. Kvankam filio de IKUE, tiu asocio estas tute memstara; ĝi eldonas trimonatan bultenon kaj organizas jaran kongreson (Lourdes en aprilo 1993, Metz en majo 1994). La membroj estas 152. La jara kotizo 40 F estas pagenda al la kasistino S-ino J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, 49150 Baugé.

En julio 1993 la katolikoj kaj la protestantoj kune kongresis en Viviers.

La Vatikanaj instancoj rekonis la valoron kaj taŭgecon de la internacia lingvo.

Radio Vatikano dissendas dufoje en la semajno esperantan programon: dimanĉe je 21.20 sur la ondolongoj 1530, 6245, 7250 kaj 7360 khz, ĵaŭde je 7.10 sur la ondolongoj 1611, 6185, 7365 khz. Por pliaj informoj petu la programon al Radio Vaticana, 00120 Città del Vaticano

La Kongregacio pri la Dia Kulto aprobis per dekreto de la 8-a de novembro 1990 la oficialan tekston de la meso en esperanto kaj permesis diservi en la internacia lingvo okaze de kongresoj naciaj kaj internaciaj. Tio valorigas nian lingvon kaj agnoskas ĝin, kiel liturgian lingvon.

Kvankam la katolikoj havas sian propran asocion, ili tamen ne staras ekster la neŭtralaj movadoj; preskaŭ ĉiuj estas samtempe anoj de UFE kaj UEA. Toleremaj, ili bone rilatas kun ĉiuj aliaj esperantistoj kaj partoprenas en la Universalaj Kongresoj kaj en la agado por la progreso de esperanto.



Vous découpez, ou photocopiez le bas de cette page; vous la remplissez, et vous en faites l'envoi à
Monsieur le Président du Parlement Européen
L-2929 Luxembourg
(une seule personne par pétition, mais aucune adresse collective)

Résumé de la pétition adressée au Président du Parlement Européen le 21 avril 1993
par MM R. Boré, Chambéry, et G. Pirlot, Ostende, Belgique

★★★★★★★★★★

Préalable: A l'heure actuelle le développement de l'économie et des techniques amène la multiplication des contacts humains, et les bouleversements politiques font que les "handicapés linguistiques" sont de plus en plus nombreux. Ce "handicap linguistique" entraîne une inégalité incompatible avec les principes démocratiques de l'Europe en gestation.

Les palliatifs:

1 - par l'enseignement. Les Etats préconisent l'apprentissage des langues européennes. Surgit alors un dilemme: ou bien apprendre toutes les langues de l'Europe, ce qui est impossible; ou bien élire une langue unique, en fait l'anglais, et faire de tous les autres Européens des colonisés.

2 - passage par des intermédiaires. Les ordinateurs ne sont pas encore suffisamment opérationnels et seuls peuvent pallier le "handicap linguistique" les interprètes et les traducteurs. Ce qui produit retards et dépenses exorbitantes. La Communauté Européenne paie deux francs pour chaque mot écrit.

Une solution réelle: l'espéranto.

Son essai, qui se déroule depuis plus d'un siècle, s'est montré probant dans tous les échanges humains internationaux oraux ou écrits. Son succès est dû à son apprentissage rapide: un an d'étude équivaut à 6/7 ans d'étude d'une langue nationale. L'absence d'embûches grammaticales et lexicales met à l'aise le locuteur qui, libéré des détails formels, peut concentrer son attention sur le contenu du message.

.../...



Pétition adressée le 21 avril 1993 au Président du Parlement Européen
par MM Boré et Pirlot



Faisant usage de mon droit de pétition, je soussigné,

nom :

prénom :

nationalité :

profession :

adresse :

après lecture du texte de la pétition citée ci-dessus, adressée à Monsieur le Président du Parlement Européen, approuve en tous points la démarche entreprise par MM Boré et Pirlot et m'y solidarise.

Le

je signe:

Pour être valable ce document doit être complètement rempli et signé. Il doit, en outre, "être écrit d'une façon claire et lisible" et être adressé à Monsieur le Président du Parlement Européen, L-2929 Luxembourg.

Nos doléances et demandes:

Il est absurde de rejeter le seul moyen réellement efficace privant ainsi des millions de gens simples d'un moyen de communication performant et les mettant sur un pied de parfaite égalité. La connaissance de l'espéranto facilite l'apprentissage d'autres langues. Donc il est inadmissible que la Communauté Européenne néglige de faire connaître la supériorité de l'espéranto.

Nous demandons: en vue de rétablir l'équité

- que cette pétition soit communiquée à tous les membres du Parlement Européen,
- que les membres du Parlement considèrent qu'il est impossible de porter un jugement sur l'espéranto sans une étude approfondie pour éviter que notre proposition soit traitée avec la même désinvolture que celle exercée envers Monsieur Glinne en avril 1984,
- que le Parlement Européen invite les personnalités politiques à se documenter sur l'espéranto avant d'en parler publiquement,
- que le Parlement européen attire l'attention des politiciens, des journalistes et des enseignants sur le fait qu'il est absurde et injuste de formuler des objections contre l'espéranto sans jamais se fonder sur l'espéranto réel; sans jamais s'appuyer sur la documentation disponible; sans jamais faire de comparaison avec les systèmes sur lesquels on est forcé de se rabattre si l'on rejette l'espéranto; sans accepter le débat fondé sur la réalité.

Telles sont, Monsieur le Président, nos doléances et nos demandes. Nous comptons sur vous et sur les membres de la Commission chargée d'étudier les pétitions pour les accueillir avec bienveillance, dans l'esprit d'objectivité démocratique qui fait partie intégrante des traditions de l'Europe.



*Le texte intégral de la pétition peut être obtenu contre 4 timbres-poste courants auprès de:
Raymond Boré, 481 Square Zamenhof, 73000 Chambéry.*

La ESPERANTISTA TRAJNETO de RABELEZO :

ĉu-ĉu-ĉu-ĉu-ĉu-ĉu-ĉu

De la 29an de Septembro 92, kreiĝis dekopa grupo da infanoj en la Francisko Rabelezo lernejo.

Tiu infanlernejo lokiĝas en Fécamp; ĉiun posttagmezan mardon kaj vendredon, estas disigitaj agadoj. La infanoj el ĉiuj diversaj klasoj rajtas elekti jenajn agadojn: informatiko, societaj ludoj, tabla teniso, kanvaso, sportaj ludoj,, biblioteko, kantado, dancado, ktp,... kaj, ekde nuna lerneja jaro... Esperanto!


Dum la trimestro, ĉiu infano povas partopreni du agadojn; ili restas nur dum kelkaj semajnoj en ĉiu agado

Tiel, l'Esperantista trajneto de Rabelezo ĉirkaŭiras kaj ĉiuj infanoj envagoniĝas kiam ili deziras dum lerneja jaro. Hodiaŭ, 28 infanoj ricevis iniciateton pri la internacia lingvo.

En unua grupo, estas 10 infanoj 6 k 7 jaraĵ kiuj kantas "Frato Jako", "Kiel faras vi?" Komence de unua kunsido, ni mallonge donas kelkajn informojn : "Kial Esperanto? Kio estas Esperanto?" Post tiu parola prezentado, mi donas al ĉiuj skribitan franclingvan dokumenton.

Ni tuj parolas esperante: "Bonan tagon! Kiel ci nomiĝas? Ĝis baldaŭ, dankon!"

Kantante, ni faras gestojn. Kun tiu grupo, ni klarigis formadon de kelkaj vortoj per ĉi-suba ilustraĵo:



Kiel l'esperanta trajneto formas vortojn?

Ludante, infanoj formas vortojn el la lokomotivo kaj vagonoj. Komence, ili distranĉis la vagonaron; poste ili skribis la monemon (o, a, e, aŭ i) sur la lokomotivon, la morfemon (ge, in, et, ej...) sur la unuan vagonon. Ili uzas la lastan vagonon por indiki la semantemon. Poste, kolektante la tuton, formiĝas la vortoj.

Per tiu ĉarma metodo, infanoj povas tre frue konscii pri strukturo de vortoj.

En la dua grupo, (9 infanoj) oni laboris pere de kanzonetoj kaj bildoj el Junulkurso. Albumetojn kun ilustraj rakontetoj oni disdonis al ili por ke ili familiariĝu kun Esperanto.

Kun tria grupo (8 gelernantoj), ni lernis "Frukto jes!". Ni dancis per kanzono de Olivier Tzaŭt. Ni ricevis poŝtkartojn de infanoj kiuj studas Esperanton. Tiu grupo sendis al infanoj el Massy poŝtkarton el Fécamp. Ni intencas korespondi kun aliaj infanoj. Nune, ni preparas artikolon por la Rabeleza lerneĝazeto.

Venontfoje, ni donos aliajn novaĵojn de niaj infangrupoj.

Do, ĝis baldaŭ!

Taos kaj Mouloud Touileb

JOGO kaj ESPERANTO :

El nia joga grupo de Grand Couronne (76), naskiĝis esperanta grupo. Tute nature! Efektive: Kio estas jogo? Jogo estas interrilato de ĉio vivanta en universo. Jogo estas unueco! Kio estas Esperanto? Esperanto estas linvo, sed Esperanto estas iu jogo! Kiel? Ĉar Esperanto estas ebleco interrilatigi ĉiujn homojn en la mondo.

Do joga filozofio kondukis nin al lernado de la internacia lingvo. Nun, ni esperas (kaj klopodas) ĝemeliĝi nian urbon kun Vilkaviškis kiu estas urbo de Litovio kaj tiamaniere interŝanĝi pere de Esperanto kaj jogo. Tiel, ni fermus rondon!

Chantal Millet

JOGESPERANTJOGESPERANTJOGESPERANTJOGESPERANTJOGESPERANTJOGESPERANTJOGESPERANT

NORMANDA BULTENO :

NORMANDA BULTENO: P.Quillaud tape les articles, fait la mise en page et envoie les documents à P.et M.Lemarchand. Ceux-ci se chargent d'effectuer les photocopies, regrouper les feuilles, les mettre dans les enveloppes sur lesquelles, ils collent étiquette-adresse et timbres postaux. Ce bulletin devrait être entre vos mains depuis un mois, mais...l'enveloppe envoyée par la poste s'est égarée!!!!!! Il a fallu recommencer le travail! Avec nos excuses